

Zhāng Jiǔ Líng,  
La akvofalo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Blinde sin ĵetas purpur' akvofala  
en la abismon tie ĉi.  
Kaj disiĝas la ruĝo kaj pala  
akvofumo eliĝas el ĝi.  
De l' altej' nebulvualo  
subeniĝas tie ĉi,  
ĝi ruliĝas tra la valo,  
de la arboj gutas ĝi.  
Glime sur la ŝaŭm' ŝvebanta  
estas arko el odor'  
kaj la akvo estas bruanta  
kvazaŭ tondro en la for'.  
El la verdo de l' arbaro  
rokoj supren levas sin.  
La prafort' de l' vivantaro  
bolas jen en la ravin'.

...

Zhāng Jiǔ Líng,  
La akvofalo

*tradukita de Xiong Linping*

De alto de dek-mil futoj,  
kvazaŭ de la ĉielo  
la kaskado fluge ĵetas sin suben,  
kaj ĉirkaŭ ĝi prezentiĝas  
nimbo jen ruĝa jen purpura.  
Ĝi, ŝajnante esti ĉielarko sub la suno,  
rekte falas inter arboj kaj tra la nebulo;  
en la serena vetero aŭdeblas  
bruo de vento kaj pluvo.  
Kiel majestas la monto Lushan!  
La nebulo kaj la akvo harmonie  
kunfandiĝas en fean iluminacion.

...

Zhāng Jiǔ Líng,  
Der Wasserfall

*tradukita de Manfred Hausmann*

Blindlings schießen die purpurnen Wasser  
über den Abbruch und dröhnen hinab.  
Und die Röte zerreißt und ein blasser  
Gischtrauch zuckt aus dem Felsengrab.  
In den Himmeln, in den Tiefen  
wehen Schleier und erglühn.  
Sträucher wabern, Bäume triefen,  
wo die Nebel niedersprühn.  
Glimmend auf dem Schaum der Schründe  
schwebt ein Bogen aus buntem Duft.  
Und das Stürzende brüllt, als entstünde  
Donner um Donner in klarer Luft.  
Aus dem Grün der Wälder wuchten  
Klippen empor zu toter Gestalt.  
Aber in den hallenden Schluchten  
rast des Lebens Urgewalt.

...

*Traduko de la ĉina poemo “Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuǐ” de Zhāng Jiǔ Líng en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2013-12.*

*Arg-987-1993 (2014-04-07 16:42:27)*

*Traduko de la ĉina poemo “Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuǐ” de Zhāng Jiǔ Líng en Esperanton de Xiong Lin-ping.*

*Arg-987-1991 (2014-04-03 10:44:09)*

*Traduko de la ĉina poemo “Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuǐ” de Zhāng Jiǔ Líng en la Germanan de MANFRED HAUSMANN (\*1898-09-10 – †1986-08-06).*

*Arg-987-1992 (2014-04-07 16:37:35)*

*La poemo aperis en la libro “Hinter dem Perlenvorhang”, Gedichte nach dem Chinesischen von Manfred Hausmann, Verlag S. Fischer, 1954. Pri la poeto vidu ankau la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred\\_Hausmann](http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred_Hausmann). Manfred Hausmann verkis tiun ĉi poemon laŭ poemo verkita de la ĉina poeto Tschang Tschiu-Ling resp. Chang Chiu-ling (673–740). Pri la poeto vidu la vikipediejon [http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang\\_Jiuling](http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang_Jiuling). Legu ankaŭ: [http://en.wikisource.org/wiki/A\\_Chinese\\_Biographical\\_Dictionary/Chang\\_Chiu-ling](http://en.wikisource.org/wiki/A_Chinese_Biographical_Dictionary/Chang_Chiu-ling).*